

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

IPR

**Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj**

ILEI

Jarkolekto 5

N-ro 2, 1975

Pizo, Italujo

Enhavo	Paĝo
D-ro Mario Dazzini: Protokoloj de la kunsidoj de ILEI-estraro en Hanofro.	25
Heinrich Matzinger: Esperanto en la 5-a klaso.	31
O. Eyssautier: Lingvistiko aplikata al instruado de vivantaj lingvoj	32
Sciigoj de la prezidanto	35
D-ro Gianfranca Taddei Braschi: Referaĵo-Esperanto	36
La lerneja evoluo	39
D-ro Catina Dazzini: Parolante pri Esperanto	40
G. F. Makkink: Rimarkoj al la raporto «komunuma instrupolitiko»	43
X-a Internacia Konferenco de ILEI - Respubliko de San Marino 23-29/7/1976	koverto 3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Aperas trifoje jare

Provizore redaktis: G. Turin
43. rue E. Magnin
F - 25300 Pontarlier

Kontoj: 1.) ILEI-IPR
25.28.71.464-40
Bank Mees & Hope NV
Rotterdam Coolsingel 93
2.) Helmut Sonnabend - Sonderkonto
Poŝtĉekkonto n-ro 3245 66-309
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikitaj kontoj.

I P R — Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR-ebliĝi abononj en landoj havantaj valutajn problemojn-kreado de infanliteraturo-verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71.464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.

Protokoloj de la kunsidoj de ILEI-estraro en Hanofro.

Ĉeestis: Rektoro Helmut Sonnabend prezidanto
D-ro Prof. Mario Dazzini ĝenerala sekretario
S-ro Gaston Turin vic-sekretario
S-ro Olle Olsson kasisto

Ne ĉeestis S-ro Johano Ingusz Vic-prezidanto

Ĉeestis kiel gastoj: S-ro Muller Heinrich
S-ino Karin Ruf
D-rino Prof. Katina Dazzini

Oni decidis akcepti la suban tagordon:

- 1-0 Informoj de la estraranoj al la estraro de ILEI
- 1-1 Raporto de la Vic-sekretario S-ro Turin Gaston
- 1-2 Raporto de la ĝenerala sekretario D-ro Prof. Mario Dazzini
- 1-3 Raporto de la kasisto S-ro Olle Olsson
- 1-4 Raporto de la prezidanto Rektoro Helmut Sonnabend
- 2-0 Konferenco kaj ILEI-sembleo 1976
- 3-0 Rilatoj de ILEI kun esperantaj kaj ne esperantaj organizoj
- 3-1 Rilatoj kun UEA
- 3-2 Rilatoj kun SAT
- 3-3 Rilatoj kun AEDE
- 3-4 Rilatoj kun UNESKO
- 4-0 Stato de lerneja eksperimento en regionoj 1 kaj 2
- 5-0 Eldonejo por IPR
- 6-0 Ĝeneralaj demandoj por la sekcioj: organizaj aferoj
- 7-0 Buĝeto. Donaco
- 8-0 Modifoj de la statuto
- 9-0 Diversaĵoj
- 10-0 Oficialaj vizitoj
- 10-1 Vizito al G.E.W. - Gewerbschafterziehungswissenschaft
- 10-2 Vizito al Pedagogia Altlernejo - Hannover
- 10-3 Vizito al Grund u. Hauptschule - Dollbergen.
- 10-4 Vizito al Kultus Ministerium - Hannover
- 10-5 Vizito al Ĝenerala Inspektoro pri lernejoj - Hannover

La estraro interkonsentis estontece post ĉiu tagorda punkto formuli la protokolon pri la punkto mem.

1-1 - S-ro Gaston Turin informis la estraron pri la instruistaj kunvenoj en la kadro de UEA-kongreso en Kopenhago 1975. Li renkontiĝis aparte kun Prof.ro D.ro Istvan Szerdahelyj, kiu estas preta rezigni al ILEI-konferenco 1976 en Budapeŝto, se ILEI organizos sian konferencon samjare en Rejkjavik. Partoprenante la instruistajn kunsidojn, S-ro Turin raportis laŭdeziro pri la Konferenco en Humlebaek. Pri la demando, ke multaj en la instruistaj kunvenoj en Kopenhago ne estis partoprenintaj en Humlebaek, multaj instruistoj nomis deĵorajn kaŭzojn de la neĉeesto.

S-ro Turin emfazis ne nur sendi la propran rezolucion al la diversaj sekcioj, sed ankaŭ samtempe la rezolucion de Humlebaek. Li ankaŭ zorgis pri tio, ke la rezolucio en Kopenhago ne koincidis kun la ĉeesto de estraranoj de ILEI en tiuj-ĉi kunvenoj.

Krome kolego Turin raportis pri la antaŭmetita leĝprojekto pri enkonduko de esperanto en lernejoj en Francio; 116 deputitoj socialistoj kaj aliaj apogis la leĝprojekton, sed pro la kaŭzo de amasiĝo de aliaj leĝproponoj en la parlamento, momente ne estos ŝanco, ke la projekto baldaŭ estos diskutata, laŭ opinio de deputito. Tamen la prezidanto de la Franca Asembleo S-ro Edgar Faure, en letero al S-ro Turin, deklaris sin persone favora al la leĝprojekto. S-ro Turin ankaŭ opinias, ke la vizito de ILEI-estraro pasintjare bone influis la evoluon de la prezentado de la leĝpropono. Li sugestas al la prezidanto, ke li skribu gratulleteron al la Franca Esperanto-Asocio: UFE.

1-2 - D.ro Mario Dazzini donis jenajn informojn:

- a) li informis pri la prelegoj de Prof.ro Lapenna en Humlebaek, tajpitaj de la Dana sekcio, kiu deziras havi 60 ekzemplerojn. D-ro Dazzini proponas alimaniere publikigi prelegojn, ekzemple en IPR, por eviti grandan ŝarĝon por unu persono. En la venonta jaro D-ro Dazzini estos pli libera por la esperantaj laboroj, pro parta pensiĝo en la oficejo. Li ankaŭ menciis, ke la italaj esperanto-kongresoj de IEF, transformiĝos al pli vasta publikigejo.
- b) li voĉlegis du leterojn, unu de D-ro Tonkin kaj alian de si mem, kiel respondo. D-ro Tonkin, laŭ tiu ĉi letero bedaŭras la nunajn ĝenojn pri la rilatoj inter ILEI kaj UEA, kaj emfazas la necesan kunlaboron por la bono de esperanto. En sia respondo D-ro Dazzini principe substrekas la neceson de la kunlaboro kaj ankaŭ informas D-ro Tonkin pri ĉi rilata decido de la komitato de ILEI, sed ankaŭ skribis pri la granda domaĝo, kiun spertis ILEI pro sia aliĝo al UEA «perdo de reprezentreĝono de Unesko».
- c) li konstatis, ke la socialismaj landoj, ĉefe Polujo, ĉiam pli inklinas al nereŝpondo. Tamen D-ro Dazzini sugestas, sendepende de la sinteno de la sekcioj en tiuj ĉi landoj, ne lasi mem la kontaktojn, ĉar la tasko de la instruistoj estas nur instrui esperanton en la lernejoj, kaj neglektado signifus perdi la perspektivon rilate esperanto-instruadon.
- d) la Nederlanda sekcio postulas la protokolojn de Humlebaek urĝe, kaj konferenci asemblee nur en Greklando, proksime de UEA-Kongreso.
- e) Eŭropa Esperanto-Centro, kiu ricevis 500 guldenojn de Institucio Hodler por la eldono de faldfolio pri la informado en AEDE, petas de ILEI la enhavon de la faldfolio. La prezidanto estus danka se kolego en Nederlando transprenus la taskon.
- f) li estis invitita partopreni en Saarbrücken, sed pro aliaj devigoj partopreni mondan kongreson de la katolikoj en Romo, li ne ĉeestis. Li ankaŭ substrekas, ke nova esperanto-movado, kiel la Neŭtrala Esperanto-movado, kiel kontraŭa organizaĵo al UEA, ne povas helpi en la solvo de gravaj kaj urĝaj problemoj de ILEI.
- g) por Unesko, diversaj dokumentoj kiel la franca traduko de ILEI-statuto pretiĝis.

1-3 - S-ro Olle Olsson informis la estraron pri letero de S-ro Langkilde, kiu faris sian finkalkulon pri ILEI-konferenco en Humlebaek. La raporto estis por la estraro tre kontentiga, kaj la estraro esprimis sian apartan dankon al la dana ILEI-sekcio, kaj petis S-ro Olsson en la nomo de la estraro danki pro la laboro. Plue li informas pri la deziro de Sveda ILEI-sekcio, ŝanĝi la statuton de ILEI en pluraj punktoj.

1-4 - La prezidanto Rektoro Helmut Sonnabend informis la estraron pri diversaj ricevitaĵoj. Temas ĉefe pri la rilatoj inter UEA kaj ILEI kaj pluraj leteroj de la Nederlanda sekcio, de la Prezidanto de UEA, de la Hungara sekcio, ankaŭ jam antaŭa opinio de la Sveda sekcio aŭ de la Soveta sekcio: oni ĝenerale deziras, ke ILEI fariĝu kunlaboranta organizaĵo de UEA. Plue li disdonis la programon pri kontribuo de la infanoj en la kontraŭrasisma jardeko. Li transdonis la liston kun la nomoj de la konsilantaro akompananta la eksperimenton en regiono 2. La prezidanto informas pri la invito de World Association of World Federalists, partopreni la konferencon en Leeuwenhorst de la 5-a ĝis la 7-a de decembro 1975. La prezidanto intencas sugesti al la Nederlanda Sekcio, ke oni partoprenu la laboron almenaŭ dum unu tago, kaj, ke la sekcio nepre raportu al la prezidanto de ILEI.

2-0 - La estraro rekonsideris kaj ree diskutis ĉiujn problemojn, kiujn nun kunligas kun la unue elektita konferencloko en Alicante. Konstatante la ne klarajn politikajn cirkonstancojn en Hispanujo kaj por eviti malfacilaĵojn kaj malagrablojn al niaj membroj, la estraro decidis nuligi la antaŭviditan konferenclokon en Alicante.

Tiucele la prezidanto de ILEI skribos al Prof.ro Zaragoza kaj dankos pro la farita laboro, kaj certigas ke ILEI certe je konvena tempo konferencos en Hispanujo. La estraro akceptis, kiel novan konferenclokon, S. Marino. Tie ĉi trovas ILEI favorajn cirkonstancojn laŭ leĝeblecoj kaj laboreblecoj, ankaŭ ĉar la oficialaj instancoj estos alparoleblaj pri lernejoj eblecoj de esperanto.

S. Marino sin prezentas survoje al Ateno laŭ ĉiuj trafikaj vidpunktoj: pro financaj kaŭzoj neniu instruisto estas malhelpata viziti poste UEA-kongreson, ĉar interalie sinprezentos ne tro multekostaj aranĝoj.

La estraro trovis la plej favorajn cirkonstancojn, kondiĉojn kaj avantaĝojn en S. Marino, post profunda diskutado kaj pritraktado de eblecoj pri aliaj konferenclokoj. Pri la ĝustaj prezoj kaj kostoj sekvis indika plano. La konferenco okazos de la 23-a ĝis la 29-a de julio 1976.

3-0 - La estraro pritraktis la temon pri rilatoj de ILEI kun esperantaj kaj ne esperantaj organizoj.

3-1 - La prezidanto voĉlegis sian leteron adresitan al UEA-estraro, en kiu li skribis, ke li ne plu deziris diskuti la eventojn post Hamburgo, kaj, sekvante la plurajn dezirojn en ILEI, tiun de la Komitato de ILEI kaj ankaŭ la proponon de la estraro de ILEI, li proponis la kunlaboron kun UEA. Li precizigis la eblecojn de kunlaboro kaj atendas nun la respondon de UEA.

3-2 - Sekvante sian intencon plane disvastigi la eblecon de kunlaboro kun aliaj esperanto-organizaĵoj, la estraro de ILEI deziras konkrete kunlabori kun SAT. Tiucele ĝi komisiis kolegon Turin kontakti la prezidanton de SAT, Ing. Levy, sciigante lin pri la propono de ILEI-estraro. S-ro Turin eksciigu al ILEI-estraro la dezirojn de kunlaboro flanke de SAT, ankaŭ sugestante fondi en SAT frakcion de la instruistoj por tiel havigi al ILEI fakan partneron.

3-3 - Rilate AEDE la estraro confirmis la opinion de la prezidanto, kiu denove letere volas kontakti kun la prezidanto de AEDE S-ro Kech. Per tio li respondos

al letero de S.ro Kech, en kiu li informis, ke li havos tempon por persona renkontiĝo nur dum Kristnasko. La prezidanto volas interkonsenti pri definitiva dato de renkontiĝo kaj en la interparolo interkonsenti pri starigo de komuna komisiono, kiu devos pritrakti la temon pri fremdlingva instruado. Laŭeble ambaŭ prezidantoj jam fiksis la temon kaj la konsiston laŭ nombro kaj kvalito de la komisiono.

Dua parolpunkto devos esti pri la membriĝo de esperantistaj instruistoj al AEDE kaj ties eblecoj kiel kunlaboranta fako kiel eŭropaj instruistoj.

3-4 - La estraro plenumis la petroponon al Unesko kaj aldonis ĉiujn necesajn dokumentojn: historion pri ILEI, liston de la sekcioj, prezenton de la agmaniero, la francan kaj esperantan tekstojn de la statuto, 4 ekzemplerojn de IPR, jam pretigis la tradukojn de la statuto en germana, franca kaj hungara lingvoj.

4-0 - La prezidanto informis la estraron pri la nuna stato de lerneja eksperimento en regiono 2. Antaŭe li raportis pri la proceduro por ricevi la permeson de la eksperimento. La kerno de la eksperimento estas en Malsupera Saksio (Federacia Respubliko-Germanio). Tie ĉi la Ministerio donis la oficialan permeson por la eksperimento. Al ĝi aliĝis Greklando (3 lernejoj), Francio (3 lernejoj), Belgio (1 lernejo), Nederlando (3 lernejoj), Germanio (3 lernejoj). Britujo lastmomente retirigis. Aŭstrujo restas invitata.

La estraro estis plue informita pri ĉiuj detalaĵoj de la eksperimento kiel daŭro, lecionoj, studhoroj kaj testadoj. La prezidanto informis plue pri dokumentoj, kiujn li sendis en la kadro de la eksperimento, ĉar, por orientiĝo de la estraro, li fiksis la nomon de la eksperimento: ILEI-Lerneja eksperimento - Esperanto Dua Regiono. Li trasdonis la liston kun la nomoj de la konsilantaro akompananta la eksperimenton en Regiono 2. Partoprenos:

- 1) Prof. Dr. Helmar Frank, 479 Paderborn, Brockhöfe 2
- 2) Dr. Hans Kasselman, 479 Paderborn, Falkenweg 10
- 3) Prof. Lothar Weeser-Krell, 479 Paderborn, Herbramer Weg 9
- 4) Prof. Dr. Uwe Lehnert, 1 Berlin 10, Spielhagenstr. 10
- 5) Prof. Dr. Gyula Décsy, 2 Hamburg 20, Eppenhofer Weg 194
- 6) Prof. Dr. W.F.Schmid, 2392 Glücksburg, Flensburger Str. 22
- 7) Prof. Dr. Erhard Hischer, 46 Dortmund, Pädagogische Hochschule
- 8) Dr. H.M.Maitzen, 463 Bochum, Auf dem Backenberg 3b
- 9) Prof. Hans-Eberhard Piepho, 6301 Polheim 1, Kantstr. 4
- 10) Dr. Aŝvinikumar, House No. 408, Indian Inst. of Technology, Kampur 208016, U.P./Hindujo
- 11) Prof. Dr. Aleksander Hrstić, Viša Ekonomska Skola Radnicko set 18, YU - 58001 Split
- 12) Prof. Dr. Pierre Janton, Faculté des Lettres, Université de Clermont F-63000 Clermont-Ferrand
- 13) Prof. Dr. H.Ruprecht, 3 Hannover, Pädagogische Hochschule
- 14) Dr. John C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW 19 3JR/Anglujo
- 15) Prof. Dr. Istvan Szerdahelyi, Legénbiri 9,8 em. 24, Budapest-15/Hungarujo
- 16) Dr. Bruce Sherwood, 507 S.Draper, Champaign Ill. 61820/Usono.

Sekcioj kiuj dezirus posedi la eksperimentan materialon, povos peti ĝin kontraŭpage de la prezidanto: kostoj ankoraŭ ne estis fiksitaj.

4-1 - La estraro aŭskultis la novan informon, ke la eksperimenta materialo de Regiono 1, verkita de D.ro Prof. Szerdahelyi estos presita en Germanujo: respondecas la presadon la sekcio de Germana ILEI-sekcio. La estraro petas D.ron Szerdahelyi informi la centran oficejon en Maribor, ke nun la materialo pretiĝas, kaj la centro bonvolu nun rapide informi ĉiujn instruistojn, instancojn, kunlaborantojn en Regiono 1. La prezidanto skribos leteron al D.ro Szerdahelyi, por ke la materialo restu propraĵo de ILEI.

5-0 - La estraro diskutis la problemojn, kiuj ekestas daŭre pro IPR. Ĝi deziras ke nia periodaĵo aperu regule je fiksitaj tempo. Tio dependas de diversaj punktoj: la plej grava estas havi sufiĉe da materialo. Manka materialo esence kaŭzigas la ne kontentigan aperon. La estraro daŭre luktas por akiri pli bonajn kondiĉojn por IPR. Pro tio interalie la estraro, konforme al jam faritaj decidoj, petas komisi en ILEI-sekcioj respondeculon kiu zorgas pri artikolo en sia lando. Jam en Maribor oni decidis, ke ili (la respondeculoj) apartenu al la redakcio de IPR. S.ro Gaston Turin, redaktoro de IPR, atendas la nomon de la respondeculo por kontakti kun li kaj ĉiajn specajn informojn de la koncerna sekcio.

6-0 - La estraro pritraktis ankaŭ la rilatojn al la sekcioj en la Ligo kaj aŭskultis la raporton de la ĝenerala sekretario, D.ro Prof. Dazzini. Li konstatis, ke la plimulto de la sekcioj ne plenumas siajn devojn. Tiu ĉi «apelacio» ne rilatas sekciojn, kiuj fidele laboris.

Ĉiu sekcio devas sendi ĉiun jaron:

- a) la raporton pri farita laboro; ĝi devas esti majo ĉe la sekretario.
- b) liston kun la nomoj kaj adresoj de la membroj, kiuj pagis la kotizon.
- c) statistikon, kiu indikas ĉiujn kursojn faritajn ĝis la 1a de Novembro: kaj la listo kaj la statistiko estas transdoneblaj ankaŭ en Majo.

Nur kiam ĉiu sekcio severe observas tiajn organizajn demandojn, povas ILEI, laŭ raciaj vidpunktoj, evolui. La estraro petas la neĉeestantan vic-prezidanton senprokraste prizorgi la eldonon kaj enkollekton de la statistika materialo laŭ jam donitaj principoj.

7-0 - S.ro Pirlot peris donacon al ILEI-kaso en sumo de 400 Belgaj frankoj; la donacinto estas S.ro Aelst. S.ro Olsson dankis la donacinton. S.ro Olsson raportas mallonge pri la buĝeto.

8-0 - S.ro Olsson informas la estraron pri la deziro de la Sveda sekcio de ILEI, ŝanĝi la statuton en pluraj punktoj. La estraro rekomendas unue tute precize ellabori la statutŝanĝojn kaj prezenti ilin venontjare 1976, kiel proponon al la membroj. La sekcio devas havi la temon dum la sekvanta jaro fari proprajn proponojn, diskutigi la proponojn kaj finfine prezenti ellaboritan proponon al la membrokunveno en alia kunsido. La sekretario atendas la precizan proponon kaj dissendos ĝin al la diversaj sekcioj.

9-0 - D.ro Dazzini voĉlegis la kvinjaran laborplanon de la Itala ILEI-sekcio; en tiu ĉi plano prezentiĝas labormaniero, metodo kaj strategio. Interalie oni planas altigi la nombron de instruantoj kaj instruistoj de esperanto ĝis 1980 al 1000. La estraro sugestas al la sekcioj peti la interesan dokumenton; estas atendiĝite aperigi ĝin en IPR.

10-0 - Ĉiuj antaŭviditaj oficialaj vizitoj okazis sukcese.

10-1 - Lunde la 3-an de Novembro, je la 11 h., la estraro vizitis la Instruistan Sindikaton de NiederSaksen en Sedanstrasse, kaj estis akceptata de la administracio S.ro Lenhart kaj de la sekretario por klerigado kaj pedagogiaj demandoj, S.ro Reebens. Post sinprezentiĝo de la estraro, oni diskutis pri la sindikataj situacioj en Germanio, Francio, Italio kaj Svedio. Montriĝis tre kolora bildo pri la sistemoj kaj agmaniero; ekzemple ĉefa zorgo en Germanio estas la problemoj de enoficiigo de junaj instruistoj; plue oni diskutis la lingvajn problemojn kaj la estraro havis la impreson ke ĝi pensigis la sindikatanon pri tiu ĉi demando kiu, laŭ impresoj, ne estis problemoj. Estas konstatale, ke la sindikato tie interesiĝis pri esperanto kaj estas preta flegi pluajn kontaktojn. Ekestis la ebleco nun per artikoloj en la sindikata gazeto atentigi la kolegojn pri lingvaj problemoj.

10-2 - Lunde la 3-an de Novembro, je la 14 h., la estraro vizitis la Pedagogian

Altlernejo Hannover, kaj estis akceptata de la Prorektor Prof. D.ro Ruprecht. Akompanis la estraro S.ro Müller kaj S.ino Karin Ruff kune kun D.rino Catina Dazzini.

Prof.ro Ruprecht donis ĝeneralan superrigardon pri la konsisto de la Altlernejo kaj montris la aŭdvidan laboratorion. Tiu ĉi aparataro ebligas per televidaj kameroj filmi ĉiun instrusituacion kaj espluati la filmojn en studa laboro, analizante ĉiujn instrupaĵojn. La prezentado estis por la estraro tre interesa ĉar efektive en la Altlernejo oni laboras laŭ ekzaktaj sciencaj metodoj.

La Prorektor gvidis la estraron en «auditorium»: impona moderna ejo, kies akustiko estas unika. Poste en aparta ĉambro oni altabligis kaj D.ro Ruprecht donis plurajn informojn pri la sistemo de Niedersaksa pedagogiaj alternejoj, kunligitaj en unu. Sub la nomo Niedersaksa Pedagogia Altlernejo estas 4 lernejoj en Hanofro. Lüneburg, Hildesheim kaj Göttingen.

La hodiaŭaj problemoj estas por la Altlernejoj nun limigi la nombron de la studentoj por adapti ĝin al la realaj cinkonstancoj. Ne ĉiu studento ricevos aŭtomate postenon en la lernejo post la diplomiĝo. Tie ĉi oni ellaboras kriteriojn. La konversacio tuŝis ankaŭ por ni gravan temon: la lingvan situacion en la lernejoj.

La estraro kontente notis, ke la Prorektor deziras la plenan demokratiigon de la lingva instruado. Nur unu deviga lingvo, li opinias, netaŭga. Li pledas, ekzemple, por la enkonduko de esperanto en la elementan lernejon kaj poste en la meza ŝtupo de la lernejo prezenti plurajn lingvojn por doni liberecon al la infanoj elekti lernotan lingvo. Li vidas la samegalajn ŝancojn en esperanto por ĉiuj, ĉar neniu ekkomence havas avantaĝon, ne nur la soci-politikajn ŝancojn sed ankaŭ la pedagogiajn valorojn li rekonas ekzemple, rilate al infanoj havantaj legmalfacilaĵojn. La estraro restos en kontakto kun Prof. D.ro Ruprecht, kiu apartenas al la scienca komisiono de la eksperimento en Regiono 2.

10-3 - La estraro vizitis la Grund u. Hauptschule Dolibergen kaj daŭrigis tie en la instruista ĉambro sian estrarkunsidon. La prezidanto tie estas la lernejestro: li informis pri pluraj aferoj de la aktuala instruado koncerne la lernejon, li montris diversaj klasĉambrojn, funkci ĉambrojn kaj modernajn lernilojn. Aparte impresis la estraron la fakto, ke meze de la kampara vilaĝo, kiu havas 2.000 enloĝantojn, situas tre moderna lernejo, kiu absolute respondas al la postuloj de la nuna tempo, kaj kiun vizitas 412 infanoj el pluraj apudaj vilaĝoj.

10-4 - Marde la 4-an de Novembro je la 10 h. la estraro vizitis la Ministerion pri Kulturo kaj Instruado. Akceptis la estraro Ministeria Dirigento S.ro Leski: ĉeestis ankaŭ du oficiuloj ŝarĝitaj de la Ministerio, kiuj okupiĝas pri lernejoj eksperimentoj: S.ro Blume kaj S.ro Kirsten.

S.ro Leski informiĝis pri faktoj de esperanto, demandante pri esperanto-instruado en aliaj landoj. Li ankaŭ volis scii, ĉu en Germanio estas aliaj lernejoj esperanto-eksperimentoj. S.ro Sonnabend parolis pri la nedeviga lerneja eksperimento en Nordrhein-Westfalen.

D.ro Dazzini tuŝis la ĝeneralan instruadon de lingvoj kaj atentigis, ke pro la diversaj elirpunktoj en Eŭropaj landoj, rilate lingvojn, unueca solvo ne realiĝos: necesas, ke ne nur pedagogiaj vidpunktoj sed ankaŭ socipolitikaj vidpunktoj en la interrilatoj de la popoloj nepre devas esti konsiderataj.

La prezidanto transdonis post duonhora interparolo libran donacon pri japana kulturo.

10-5 - Marde la 4-an de Novembro je la 15 h. la estraro vizitis la lernejan urban «decernenton» S.ro Warmbold. Estis akceptata en la akcepta halo de la urbodomo. Ĉeestis ankaŭ S.ro Siersleben, kiu devas zorgi pri la sekondara ŝtupo 2 «Gimnazioj». La akcepto flanke de la sinjoroj estis ekesterordinara afabla kaj ĝentila. Post reciproka prezentiĝo, ekestis vigla diskuto pri lingva instruado. Spicita estis la agrabla atmosfero per glaso da vino. Multflankaj problemoj de al lingva instruado estis alparolitaj. La estraro sentis la grandan intereson al niaj klopodoj rilate esperanto-

Montriĝis ke por esperanto, kvankam ne instruata en lernejoj, oni havas nun bonan elirpozicion. La «decernento» promesis helpi en la kontakto kun la lernejoj inspektoroj por tiel ebligi interparolon kun ili.

Li ankaŭ volas disponigi lernejon kun moderna lingva laboratorio por geinstruistaj esperanto-kursoj.

Interesa estas la sugesto de S.ro Siersleben ekzameni la kondiĉojn por organizi lernejan eksperimenton kun infanoj de fremdaj laboristoj kaj kune germanaj infanoj.

La estraro decidis denove kunveni iam dum printempo: dato kaj loko estos fiksotaj.

La prezidanto dankis la estraranojn pro la profunda kaj vigla kunlaborado.

La kaso de la Ligo ne estis ŝarĝita pro la estrarkunsido en Hannover.

La estrarkunsido finiĝis je la 17,50 h. de la 4a de Novembro 1975, en la Halo de la urbodomo en Hannover.

de d.ro M. DAZZINI

Esperanto en la 5-a klaso.

Instruistoj kapablas lerni Esperanton per memstudado. Por instrui lingvon, kiu estas 10-foje pli facila ol ekzemple la angla, oni ne bezonas la saman metodon, kiel por instrui nacian lingvon. Do, instruisto povus lerni Esperanton kun siaj gelernantoj, tio en tiu senco:

Instruisto, kiu bone konas siajn gelernantojn,
kiu havas bonajn rilatojn kun siaj gelernantoj,
kiu krome konas ankaŭ la gepatrojn,

rakontas fine de la 4-a klaso pri Esperanto, kaj li demandas:

«Ĉu ni volas lerni Esperanton kune? Kiuj el vi volas partopreni la kurson?»

Nature li parolas ankaŭ kun la gepatroj en porgepatra vespero. Li diros tute klare, ke Esperanto ankaŭ por li estas novaĵo; sed ke malgraŭ tio li promesas, ke la gelernantoj post unu jaro (3 lecionoj semajne) havos bonan fundamenton de la lingvo. Se la kurso efektiviĝos, li komencas la studadon jam en la ferioj. En la klaso, kiam li klarigas la vortojn, regulojn ktp., li ripetas tion, kion li lernis antaŭe. *Instruante, oni lernas!* Li preparos ne nur la lecionon, sed ĉiam iomete pli, tiel ke li estos tralaborinta la libron en 1/2 jaro. - Poste li aĉetas libron por progresantoj kaj studas ĝin dum la dua semestro. Do, post unu jaro, li jam sufiĉe bone konas la lingvon.

Per tiu konsilo mi volas kuraĝigi la geinstruistojn.

Kompreneble, tiu metodo ne eblas, se temas pri nacia lingvo.

Heinrich Matzinger, Zuriĥo

Lingvistiko aplikata al instruado de vivantaj lingvoj.

En 1886, dum unu el siaj kursoj en la Sorbonne, la lingvisto Abel Bergaigne ekkriis. «Lingvistiko estas en la aero de la jarcento. Eĉ se oni fermus pordojn kaj fenestrojn kontraŭ ĝi, ĝi enirus tra la fendetoj». (Internacia Revuo pri Instruado. Feb. 1886).

Estas amuze konstati ke, preskaŭ cent jaroj poste, la sama frazo povus esti esprimita en similaj cirkonstancoj kaj kun la sama dubinda tono koniganta ian agacon rilate al tiu «modo».

Lingvistiko vere, ne ankoraŭ sukcesis eniri la tutan bastionon de la Supera Klerigado kaj enrompi la Kontraŭstaron de la literaturistoj kaj Pedagogoj.

Tamen okazis certa evolucio, en la senco ke de nun estas peto pri lingvistiko de lingvo-instruistoj, kiuj senĉese de post kelkaj jaroj vidis, ke oni atakis ne nur sian rolon kiel instruantoj sed ankaŭ la enhavon mem de sia instruado kaj, kiuj sin turnas al tiu «universala» scienco, esperante, ke ĝi povos alporti al ili seriozecon, sciencecon kaj pravigecon.


Tiun agmanieron faritan samtempe el deziro kaj rifuzo, el peto kaj malakcepto, la lingvisto ĉiutage devas konsideri en sia rilato kun siaj studentoj, kolegoj aŭ ĝenerala publiko. Por kio utilas lingvistiko? Ĉu ĝi povas ludi rolon en instruado? Je kiuj niveloj, sur kiuj kampoj, por kiuj lingvoj?

En tiu raporto, ni limiĝos al la alporto de lingvistiko al la instruado de vivantaj lingvoj, patran lingvon inkluzive.

Tri vortoj devas esti tenitaj en memoro el la proponita titolo.

LINGVISTIKO APLIKATA INSTRUADO

La sekvanta tabelo permesos al ni pli bone kompreni tion, kio estas entena en tiuj tri vortoj.



Io devas esti tute klara, la tri estas absolute ne disĝantaj. Teorio estus tute neutila se ĝi ne kondukus al aplikajoj, al kono de la valoro de tiuj aplikajoj, se oni ne efektivigus ilin en konkretaj situacioj de instruado. Kompense, la problemoj renkontitaj dum tiuj praktikaj realizaĵoj permesas pripensi denove pri kelkaj aspektoj de la teorio kaj tiel progresigi ĝin. Plie, la limoj inter teorio kaj aplikajoj, aplikajoj kaj realizaĵoj estas tre malfacile difineblaj.

Sajnas do necese, ke ĉiu instruanto de lingvoj havu en ia momento de sia klerigado iniciadon al la tri kampoj pri kiuj ni ĵus parolis: tiu de teoria lingvistiko, tiu de aplikata teorio kaj tiu de didaktiko.

Kampo de teoria lingvistiko

Lingvistiko estas rimarko pri la lingvo, tiu kapableco unika por homo krei sistemon de arbitraj signoj, kodon, kies kunigo rilatas al distingaj ideoj. La produkto de tiu kapableco konsistas el la naturaj kaj artefaritaj lingvoj. Pere de la priskribo kaj komparo de tiuj diferencaj lingvoj (aŭ kodoj) la lingvisto deduktas sian konon de la funkciado de la lingvo kiel sistemo.

La lingvisto studas lingvon en ĝiaj du funkcioj: esprimo kaj komunikado. Tiu lasta supozigas ke li atentu en sia observado pri la kondiĉoj de produktado de parolado, tio estas, la ĉeestado de parolanto kaj aŭskultanto havantaj inter si ian tipon de rilatoj (amemaj, sociaj, hierarĥiaj); ili estas enmetitaj en situacio de komunikado, kiu entenas la objekton la momenton kaj la lokon de la komunikado same kiel la tutan sperton vivatan de ĉiu el la du interparolantoj kaj, kiu, kvankam implicitan, ludas tamen gravan rolon en la interparolado.

Por povi verki teorion pri la lingvo, la lingvisto utiligas aliajn rilatajn sciencojn. Ekzemple, por difini kiuj estas la rilatoj inter lingvo kaj la ekstera mondo, la lingvisto utiligos la eltrovojn:

- de semiologio aŭ scienco de signoj (rilato inter la signo kaj la ekstera aŭ referenca mondo).
- de antropologio kaj etnologio (kiel lingvo dividas la realon; kiel, kompanse, klereco, tio estas la sperto de realo, kreas la lingvon de iu speciala grupo).
- de sociologio (problemo de normo, de la niveloj de lingvo, de la socia aŭ ideologia rolo de lingvo).
- de fiziologio (problemo de vida aŭ aŭda percepto).
- de fiziko (rilato inter akustiko kaj fonetiko; teorio de informado kaj leĝoj pri la ebleco de lingvoj).

Same, por studi la rilatojn inter lingvo kaj la interna modo de homo, la lingvisto ofte petos helpon de la psikologiisto. Nova scienco naskiĝis el tio, *psikolingvistiko*, kiu studas problemojn tiel diversajn, kiel la diferencojn de akirado inter la patra kaj la akiritaj lingvoj, la kialojn de lernado, la transdonojn kaj interferencojn inter la kontaktigitaj lingvoj, la faktorojn de kreado, la konfuzojn de parolado aŭ konduto, la rememorigadon de la gramatikaj strukturoj, la psikomovajn agadojn, la ĉirkaŭaĵojn kaj la aŭtomatismojn.

Konante tion, kion ĉiuj tiuj sciencoj povas alporti al li, la lingvisto povas tiam studi lingvosciencan kaj tion, kion ĝi povas alporti: lingvojn en tri diferencaj aspektoj:

- La lingvo en ĝia historia evoluado (diakronika lingvistiko)
- La lingvo en ĝia nuna aspekto (sinkrona lingvistiko, en ĝiaj diferencaj aspektoj: fonologio, sintakso, semantiko kaj pragmatiko).
- La lingvo en ĝiaj diferencaj produktoj (komparita lingvistiko), same de la vidpunkto de la entenaĵo, kiel de la esprimado.

La kampo de aplikita lingvistiko.

Aplikita lingvistiko iras kaj prenas el ĉiuj fontoj, kiujn ni ĵus menciis, tion, kio povas koncerni precizan kampon, kiel la akirado de patra lingvo, la instruado de vivantaj lingvoj, la aŭtomata tradukado, la traktado de informado, la patologio de la lingvo k.t.p.

Koncerne nin, tio estas la instruantoj de lingvoj, aplikata lingvistiko povas konsideri lingvojn el pluraj vidpunktoj, nome kiel 1) substanco, 2) kodo, 3) psikologia fakto, 4) sociologia fakto.

1) fonetiko studas lingvon kiel substancan. Ĝi povas priskribi la movojn de la sonfaranta aparato, kiuj estas utilaj por formi la sonojn de ia lingvo, studi la akustikajn proprecojn de tiuj sonoj, observi kiel tiuj sonoj estas ricevataj kaj transdonitaj de la aŭda aparato. Tiuj studadoj ebligas difini tion, kion oni devas postuli de la lernanto por atingi sufiĉan komprenon, kaj kiuj estas la akcepteblaj toleroj.

2) se ĝenerala lingvistiko estas konsidero pri la universala funkciado de ĉiuj eblaj homaj lingvoj kiel kodoj, aplikata lingvistiko limiĝos al la priskribo de nur unu el tiuj kodoj aŭ al komparo kun unu aŭ pluraj aliaj kodoj. Priskribi lingvon estas iam fari aplikatan lingvistikon. Sed estas pluraj metodoj por priskribi lingvon, ĉar estas pluraj alproksimiĝoj, pluraj teorioj de lingvoj. Oni povas ekzemple koncepti *normativan* priskribadon de tio, kio devas esti lingvo: tiu estas uzita en la tradiciaj gramatikaj lernolibroj. Oni ankoraŭ povus koncepti priskribadon, kiu estus *konstato* de tio, kio estas la efektiva uzado de lingvo, en ĝia aŭda, same kiel en skriba formo, konstato, kiu entenus nenian juĝadon de subjektiva valoro. Sekvante ĝis ekstremo tiun postulon de objektiveco, oni provis trovi por priskribi lingvon, lingvon tiel severan, kiel estas la lingvo de matematikoj. Tiel estas la provo de la *formala lingvistiko* (Chomsky, Saumjan, k.t.p.). La metodoj mem de priskribo estas tre diversaj; oni povas studi la diferencajn elementojn de frazo laŭ la funkcia loko, kiun ili okupas en la sintaksa strukturo (*tagmemiko*) aŭ ankoraŭ laŭ la hierarĥiaj rilatoj, kiuj kunigas ilin (*analizo en senperaj konstituajoj*). Oni povas, aŭ ne, peti de la signifo pravigon de la priskribo. Oni povas konsideri la kondiĉojn de produktado de la parolado, distingi eldiron kaj eldiritaĵon k.t.p.

Se la priskribita lingvo restas ja ĉiam sama, la metodoj de priskribado estas diferencaj, la reguloj de funkciado de la lingvo tiel trovitaj estos difencaj. kiel povos la instruanto elekti inter ĉiuj tiuj teorioj por fondi sian instruadon? Estas, konklude, necese por li, koni ilin sufiĉe bone por pli bone disigi sin de ili, por ne partopreni kverelojn de instruado kaj por preni tion, kio estas la plej bona kaj efika el ĉiuj fontoj laŭ la bezonoj de sia instruado.

3) Laŭ la psikologia koncepto de lernado, kiun li memoros la lingvisto kiu aplikas, reĝustigos tre diferencajn metodojn de instruado. Inter la plej konataj metodoj de tiuj lastaj jaroj ni citu ekzemple la aŭdan orelan metodon kaj ĝiajn strukturajn ekzercadojn, kiu estas bazita sur behaviorista koncepto de instruado de la lingvo (pere de stimuloj), la aŭdan okulnan metodo, kiu uzas la observadojn de semiologoj kaj psikologoj pri la problemoj starigitaj de la akirado de la signifo, la nunaj tendencoj de «kreantaj» aŭ «funkciaj» metodoj kiuj klopodas por kunigi la pozitivajn aspektojn de la rekta metodo (situacio de vera komunikado, spontaneco de esprimo, motivado) kaj de la aŭda parola metodo (preciza fiksado de la objektivaj) akurata progresado, rangosupereco de la gramatika lernado sur tiu de la vortaro).

4) Fine, pli bona kono de lingvo kiel socia fakto permesas al la instruantoj pli bone koni kaj sekve pli bone regi la rilatojn interne de socia grupo, tiu de la klaso, ekzemple. Ĝi permesas al ili ankoraŭ fari pli bonajn elektojn en la enhavo de sia instruado, ekzemple de la nivelo, de la parola skalo de la lingvo, necesaj al iliaj lernantoj laŭ la situacioj de komunikado, kiujn ili probable renkontos en sia futura profesia vivo, aŭ ankoraŭ de la elementoj de parolado necesaj por pli bona komunikado inter homoj (fatika funkcio de la lingvo) aŭ por pli nuanca esprimado de la penso (esprimoplena funkcio de lingvo, problemo de kondiĉoj k.t.p.).

La kampo de didaktiko.

La instruanto devas ricevi metodologikajn instrumentojn necesajn por fari pli bonan analizon de la pedagogia situacio.

- kia estas lia publiko? (lia aĝo, socia kultura, nivelo, motivoj).
- kiuj la objektoj de lia instruado? (kultura aŭ profesia celo, skriba aŭ aŭda lingvo, nivelo de kono je la eniro kaj eliro).
- kia estas la daŭro de lia instruado? (intensa aŭ malintensa lernado, komenca aŭ senĉesa klerigado).
- kie estas la loko de tiu lernado? (Lernejo, centro de senĉesa klerigado aŭ loko de laboro, lingvistika medio homogena aŭ malhomogena k.t.p.).
- kiuj estas la rimedoj, kiujn li havas? (teknologiaj rimedoj de eklernado).
- kiuj estas la instruantoj? (nivelo de klerigado, socia statuso).

Kiam li posedas tiujn respondojn, la instruanto devas kapabli analizi, kiuj estas iliaj rezultoj sur la tipo de instruado, kiun li devos elekti. Estas pro manko de tio, ke la spertoj de senĉesa klerigado montras sin kelkfoje malsukcesaj.

La instruanto devas ankaŭ lerni kiel oni verkas metodon aŭ lernolibron; kiuj estas la kriterioj de elekto kaj organizado de la enhavo, la kialoj de la elekto de iu prezentado, de la enhavo laŭ la diferencaj stadioj de la klaso; la teknikoj de plifortigado de la lernado (ritmo de memorigado) kaj tiuj de konfirmado (de la elekto de la formo de prezentado, aŭ de la metodoj mem de konfirmado: docimologio).

Nur poste, la instruanto devas lerni kiel uzi tiujn diferencajn metodojn aŭ lernolibrojn unue de la observado de klasoj, poste pere de la gvidata utiligado de tiuj metodoj en reala situacio de instruado. Sed tiu lernado ne devas esti kolekto de receptoj, sed daŭra pripensado pri la kialo kaj la kiolo de ĉiu minuto de la instruado. Nur tiam la dialektika rilato inter la teorio, la aplikado kaj la realigado prenos sian tutan signifon.

- Verkis: S-ino O.Eyssautier
Profesorino Bordeaux Universitato
- Tradukis: S-ro G.Eyssautier
Lyon

Sciigoj de la prezidanto.

Konforme al niaj decidoj en Humlebaek 1975 mi proponis al UEA la kunlaboron kun ILEI. La propono estas strikte ligita al reciproka estimo kaj ne enpenetrado en la aferojn de la partnera organizaĵo. Decidite estis en Humlebaek pri partopreno de ILEI en la Kontraŭ-Rasisma Jardeko de UNESKO. La komitato aŭdis programon alvokante ĉiujn sekciojn, organizi en la propra lando la laboron en la lernejoj. La programo tekstas:

Programo

Pro la politikaj necertoj la estraro de ILEI rezignis asemblei kaj konferenci en Hispanujo. Sekvante plurajn dezirojn la estraro survoĝigis la konferencon al la UEA-kongreso, dependante esence de lokaj aranĝantoj kaj samtempe priatente niajn proprajn interesojn. Konvena loko estas San Marino, komforta vojo al Greklando, malaltaj vivkostoj en San Marino, interesaj renkontiĝoj. Nia konferenco kaj asembleo komenciĝos 8 tagojn antaŭ la uea-kongreso. Laŭ propono de ILEI, la rezultato estos prezentita en Ateno.

Referaĵo - Esperanto.

Lernojaro 1974-75, instruistino Gianfranca Taddei Braschi.

Je mia tria jaro Esperanto-instruado, mi povas diri ke, ankaŭ se ne plenplene kontenta, mi estas almenaŭ konvinkita, ke mi iras la ĝustan vojon. Multaj flankoj pli klare evidentiĝis, kaj la situacio estas kuraĝiga.

La ideo de la Direktoro apliki paralele la instruadon de E. kaj de la itala lingvo, valorigante E-on, kiel komparan lingvon, ŝajnas al mi vere bonega. La ĉeesto en la klasĉambro de la klasinstruisto, dum la E.-lecionoj ebligas la kunligojn kaj igas kreiva la kunlaboradon.

Mi rimarkas, ke la ĉeesto de E. en la lernejo, kiel estis enkondukita en «OL-TRESAVIO» igas pli konkretajn kaj ĝis nun ne ankoraŭ ekspluatatajn pedagogiajn eblecojn. Valoraj estis sendube kaj estas la idealaj motivoj kiel la internaciismo en ĉiuj soci-kulturaj aspektoj; interesa la propedeŭtiko al la lernado de la fremdaj lingvoj, sed tute ne atendita estis por mi la senpera kaj konkreta valoro, kiun E. havas en la instruado de la itala lingvo. La lingva komparado instigas al daŭraj pripensoj, kontroloj, profundigoj, klarigoj, kiuj, lau mia opinio, ja havas gravecon en la logika formiĝo de la gelernanta menso. Pere de tia komparado aperas pli evidente la gramatikaj funkcioj de la unuopaj morfemoj en la lingva strukturo kaj enfokusigas kelkaj mensaj kategorioj, kiujn la itala lingvo ne povus klarigi kaj precizigi.

Pro tiaj premisoj kaj sekve de la diversaj pozitivaj aspektoj pruvitaj de E., mi opinias, ke, ĝia enkonduko en la lernejon samrajte kun la aliaj studobjektoj, estas legitime acelinda.

Mi deklaris, ke mi estas konvinkita esti sur la ĝusta vojo, ankaŭ se ne plenplene kontenta pri mia laboro. Atingi la plej bonon ne estas facile kaj interalia mi opinias, ke ne eblas.

Multaj malfacilaĵoj, kelkfoje bremsas kelkajn optimismojn, reduktas la rezultojn, krizigas la metodojn. Sed ĉi tiuj estas aspektoj, kiuj ne devas nin deflankigi de la problemo en ĝia tuto kaj esenco. La metodikaj problemoj bezonas alĝustigajn antaŭleĝojn ĉar ili celas kaj rilatas al la treege moviĝema, dinamika kaj kelkfoje ne antaŭvidebla realaĵo, kiu estas la infano.

En mia laboro mi sekvis la programon de la Direktoro, ĉar lia estas la ideo pri la komparo kun la itala lingvo kaj la aliaj lingvoj, sed mi sentis min plene libera sekvi mian metodikon.

Tiel, ankaŭ se instruante mi baziĝis sur la lingva komparo, al mi plaĉas sekvi ne pogradajn gramatikajn metodojn en kiuj ŝajnas al mi ligi aride la infanon, sed tian komparon mi greftas en la vivan konkretan paroladon; tial ke la gramatika enprofundiĝo estu nur parentezo, momento de natura situacio, logika medito, sed ne la ĉefa aspekto de la situacio, kiel estus se mi ekstartu kun la premo sekvi sisteman gramatikan metodon.

Multe helpis al mi ĉi-jaron, ke la infanoj havis sian lernolibreton kompilitan laŭmezure de la infano en la lernejo, kaj laŭ la metodo aplikita. La libretoj estas ambaŭ valoraj, ĉu la gramatika, ĉu la konversacia lernolibreto. Por sekvi mian linion evitante la sisteman gramatikan instruadon, kiu laŭ mi estas arida, mi ekstartis de la konversacia libreto kaj de la simplaj frazoj en ĝi entenataj kaj iom post iom, laŭ la natura sinsekvo mi enkondukis la lernadon de dedukta gramatiko.

La mia estas malrapida laboro ankaŭ ĉar limigita estas la tempo je dispono. Ĝis nun oni alfrontis malmultajn temojn: la lernejo, aŭtuno, vintro, la domo. Pri la domo ni haltiĝis ĉar mi pensis vivigi la lecionon aplikante la DIALOGAN RECITADON pri la fabelo de la TRI PORKIDOJ, multe simpligita kiel ĝi aperas sur libreto n.ro 2.

La kompilo kaj la traduko de la dialogoj okupis 5 lecionojn, ĉar oni laboris grupe; ĉiuj infanoj persone kontribuis, ĉu en la kompilo, ĉu en la traduko. La lingva komparo kun la itala lingvo sekvis la tutan preparlaboron, kaj ĝia evoluo laŭ mi fruktodona, kaj utila, ĉar la infanoj sekvis kun intereso kaj evidenta profito, almenaŭ laŭmomente, ĉu en Esperanto ĉu en itala lingvo. Kelkfoje mi rimarkas, ke mi pli insistas pri la itala ekzercado ol pri la Esperanta, se, intence tio ĉi kulpigas min rilate E-on, mi opinias, ke en mia lernejo ĝi havas senkulpigon ĉar Esperanto estas la ĉefa motivo. En la klasoj la laboro iras samritme, ĉu en la IV-aj, ĉu la V-aj. Ankaŭ la infanoj de la IVa F., kiuj alfrontis ĉi-jare unufoje la studon de Esperanto, sekvas kun intereso kaj vicleco; multaj el ili, mi povas diri, estas je la nivelo de tiuj, kiuj studas Esperanton de tri jaroj.

La laboro en la grupoj laŭ elekto, ne plu estas amasa laboro, kaj oni devas fari alimaniere, kun alia spirito. E. devas liberiĝi de la lerneja aspekto kaj devas esti instruata kiel ludo. La ludo, kiu plej nun taŭgas al nia celo estas la DRAMIGADO, Mallongaj scenoj el famaj fabeletoj, aŭ inventataj kune, kiuj okupas en la kompilado unu lecionon, povas taŭgi. Ĝis nun ili estas 5 aŭ 6. Fiaskis la plej longaj, kiujn mi trovis sur la libroj, male restis en la intereso aliaj mallongaj, hazarde trovitaj aŭ kreitaj. Ekzemple tiu, kiu ekestis de lumbildo titolita «LA DU LEPORIDOJ». Sur la lumbildo vidiĝas du leporidoj batalantaj pro brasiko, vulpo alproksimiĝas por manĝi la leporidojn, ĉasisto alvenas kun pafilo. Sekve de ĉi tiuj tri elementoj mi invitis la infanojn riĉigi la rakonton. Mi nomis la leporidojn Meo kaj Ĝeo kaj tuj ekiĝis la dialogo, kiun mi pretendis tuj en E. post mallonga pridiskuto italingve. Leporido alvokas la alian invitante lin(=ĝin) ludi en la herbejo ĉar estas suna, bela tago. Estas mallonga diskuto pri kia ludo, poste diskuto pri la ludiloj hejme lasendaj, ĉar oni povas ludi per papilioj kaj floroj. La sceno translokigiĝas sur la herbejon kelkmomente, kaj iu sentas malsaton kaj jen brasiko benata, kiu ŝajnas savi la situacion, jen sekvas disputo, je kiu profitas vulpo, sed je la helpkrioj alvenas ĉasisto kiu fuĝigas la vulpon. Tiel, havante je dispono kelkajn bazajn elementojn aŭ vefton, en kunlaboro kun la infanoj elfontis dialogo kaj mallongaj scenetoj. La infano tamen volus roli antaŭ publiko, tia estas la plej grava motivo por li, kaj tion ĝis nun ni ne sukcesis, ĉar la tempo estas mallonga kaj la grupoj ne stabilaj. Ĉi tiu estas negativa aspekto, kiu ofte faligas la intereson por la laboro.

Alia grava afero estas la INTERNACIA KORESPONDADO. Ĝi estas grava punkto, kiu interesas kaj vivas, kiam la poŝto funkcias, malvigliĝas, kiam estas malfruoj. En miaj dekunu klasoj mi komencis korespondadon kun 18 eksterlandaj lernejoj:

- IV A Hungarujo (Kornò)
- IV B Hispanujo (Alicante)
- IV C Rumanujo - Nov-Zelando - Usono.
- IV D Britujo - Japanio.
- IV E Finnlando - Usono (Chicago)
- IV F Bulgarujo - Francujo (Lion)
- V A Bulgarujo (Sumer-Preslav)
- V B Jugoslavujo (Somzale)
- V C Francujo (Paris) Jugoslavujo (Ljubljana)
- V D Hungarujo (Budapeŝto)
- V E Jugoslavujo (Zagreb)

La laboro pri korespondado iris laŭ miaj deziroj. Mi volis eviti korespondadon nur individuan, ĉar la infano sola ne povas regi ĝin kaj laciĝas, post unua interŝanĝo de informoj ne plu scias kion diri; mi volis ankaŭ eviti korespondadon nur grupan ĉar la infano seninteresiĝas dezirante kunporti hejmen ion personan por montri ĝin al la gefamilianoj kaj geamikoj. Por eviti ambaŭ malagrablaĵojn oni faris kolektivajn kaj individuan korespondadon samtempe. Ni eksendis en la sama koverto kolektivajn laboraĵojn kaj unuopajn bildkartojn de la infanoj, petante de nia plu-mamikoj sekvi la saman sistemon.

La 1a sendaĵo, kiel grupa laboro konsistis el tri desegn-paperoj, sur la unua estis desegnita Italujo, dividita je regionoj, la nia estis flavkolora kaj aldonitaj estis kelkaj informoj:

Nia lando estas Italio. Kiel vi vidas ĝi havas la formon de boto. Italio dividiĝas en 20 regionoj. Nia regiono (tiu flava) nomiĝas Emilja-Romanja.

Sur la dua estis desegnita nia regiono kun la 8 provincoj, sur la tria ni algluis bildkarton kun panoramo de CESENA kun jenaj tekstoj:

Nia regiono estas Emilja-Romanja. Ĝi estas la plej suda de la norda parto de Italio. En ĝi estas ok provincoj. La ĉefa urbo estas Bologna (legu: Bolonja); tie estas Universitato. Cesena troviĝas en la provinco Forlì.

Cesena (legu: Cezena). estas malgranda urbo. Ĝi situas je 15 km. de maro-Adriatiko kaj ĉe la piedoj de montoj. En la urbo estas antikvaj konstruaĵoj. La Cezenanoj estas gastamaj kaj laboremaj.

La infanoj sur la individuaj bildkartoj ekprezentis sin per simpla frazo:

Mi estas Mi deziras ricevi bildkarton . . .

Ĉi tiu nia sendaĵo trovis saman respondon el Finnlando, Hungarujo, Bulgarujo, Britio, Francio, Jugoslavio. Aliaj landoj sendis nur individuajn korespondadojn.

Nia dua sendaĵo havis kiel kolektivajn laboraĵojn 4 paperfoliojn dediĉitajn al 4 Italaj urboj: ROMA, FIRENZE, VENEZIA, MILANO. Ni kolektis uzitajn bildkartojn, algluis ilin sur la unuopaj paperoj kaj skribis informojn pri la respektivaj urboj. La infanoj verkis letereton kompilitan kune informante pri la vizitata lernejo, pri la klaso, pri la lernejaj vestoj, kaj petis samajn informojn de siaj eksterlandaj geamikoj.

Por kelkaj landoj estis malfacilaĵoj, en la senco ke ankaŭ ili ne respondis aŭ ili respondis nur unufojon, ni ne scias la kialon.

Kun Hungarujo okazis jam la tria sendaĵo: paperfolio dediĉita al la italaj moneroj. Ni algluis monerojn je 5 - 10 - 20 - 50 Liroj kaj ni aldonis faksimilon (tio estas per ludmarkoj) por la plej altvaloraj je 500 - 1000 - 10.000 Liroj. Nia laboro je la fino de Aprilo haltis. Mi ne pensas, ke ni sukcesos sendi aliaĵojn pro la malrapideco de la interŝanĝoj. La infanoj entuziasmiĝas, kiam ili preparas siajn leteretojn, ĉar, krom la komunan tekston, kiun ili preparas kune, ili povas personigi siajn leterojn per desegnaĵoj, pensoj, aldonante poŝtmarkojn, monerojn, eĉ karamelojn, plumojn kaj diversajn aliaĵojn.

Nature tia entuziasmo kreskas kiam estas ili, kiuj ricevas la sendaĵon flanke de siaj eksterlandaj geamikoj. Alveno aparte feliĉa okazis en la IVa D. Dum la distribuado de la poŝtaĵo eniris S.ro Fantini, kiu vidinte la okazantaĵon ekkriis: ŝajnas al mi, ke alvenis « La Befana » virino Epifanio, kiu alportas donacojn. Verdire la ĝojo estis nepriskribebla. Knabino Valentina Mambelli, en sia letereto estis trovinta krom karamelojn kaj poŝtmarkojn, broditan naztuketon kaj du ĉarmajn rubandetojn por ornami la hararon. Ŝi estis la centro de bonvola envio de tiuj, kiuj ne estis ricevintaj poŝtaĵon. Ĉi tiuj infanoj nature estas feliĉaj korespondadi kaj estas fantaziemaj en la preparo de siaj leteretoj. Por aliaj, por tiuj, kiuj de monatoj atendas ricevante nenion, la intereso estingiĝis.

Alia grava afero pri la korespondado estas la kunlaboro kun la klasa instruisto. La kolektivaj laboraĵoj alvenintaj, interesaj precipe laŭ geografia vidpunkto, povas kun profito esti utiligataj en la lerneja laboro de la klaso. Estas geinstruistoj, kiuj malintensas interesan materialon, kaj ne kapablas uzi ĝin por siaj lecionoj, male estas aliaj, kiuj kapablas el simpla bildkarto elpreni motivaĵojn por interesaj studoj kaj eksperimentoj. E. sendube en la lernejo donas sugestojn por multaj iniciatoj, oni devas nur kapti kaj uzi ilin. Lasta punkto en mia listo de la aktivecoj kunligitaj al E. estas la intergastigado kun fremdaj infanoj. Ĝis nun tio okazis kun slavaj infanoj, tamen pere de la slavo, grupeto de niaj lernantoj renkontiĝis kun infanoj de aliaj landoj. En Zagrebo fakte, kien ili iris por partopreni al internacia pupteatra festivalo por geknaboj en Esperanto, ili kontaktiĝis ankaŭ kun Ĉeĥoj, Hungaroj kaj Angloj. Estas tamen necese, ke ni klopodu larĝigi tiajn interŝanĝojn kun aliaj landoj kaj jam ni klopodis interrilati kun Aŭstra kaj Franca Lernejo. Aŭstrio ne konsentis pro malfacilaj translokiĝoj dum la lerneja periodo. Francio respondis, ke preferiĝas

prokrasti la interŝanĝan vizit-projekton al la venonta jaro, kiam la lingva preparo de la infanoj estos pli bona. Venontjare estos bone ekstarti en la interrilatoj en pli konvena tempo, ĉar tiuj estas okazoj kaj spertoj vere valoraj por niaj infanoj.

La vojaĝoj kaj la rektaj kontaktoj kun landoj kaj popoloj fremdaj en la formo, kiun E. permesas, tial ke oni vivas en la familioj kiel en la propraj, estas konkretaj lecionoj pri vivo kaj pri homa frateco, ekster la sterilaj kaj la fiaj naciismoj.

La lerneja evoluo.

dokumento 3 de la laborplano

1. 1973 - 1975 periodo de antaŭpreparoj por lernejaj eksperimentoj (vidu la dokumenton 4 sub punkto 5).
- 1.1 Por antaŭprepari lernejajn eksperimentojn estas rekomendinde eluzi jam atingitajn rezultojn en la ĝisnunaj eksperimentojn klasoj.
- 2.0 1975 - 1978 internaciaj lernejaj eksperimentoj en zonoj kaj regionoj, en kiuj estas la kondiĉoj por realigi eksperimentojn.
- 2.1 Lokaj eksperimentoj estas tiaj eksperimentoj, kiuj havas apartajn didaktikajn celojn, kiuj povas esti lingvistikaj, komparaj kaj helpantaj al naci kaj fremdlingva instruado.
- 2.2 Daŭrigo de la Esperanto-instruado laŭ la nunaj kondiĉoj. La nunaj eblecoj devas esti eluzataj, ĉar ili donas la ĝis nun plej solidan bazon de nia agado.
- 2.3 Eksterlerneja aplikado de esperantlingva kono. Ĝi estas la plej grava punkto de nia tuta laboro. Per tio ni distingiĝas de ĉiu alia fremdlingva instruado. Uzebla estas la praktika gvidilo: La formoj de eksterklasa aktiveco de gelernantoj kaj praktika aplikado de lingvaj kapabloj.
- 2.4 1978 Someraj lernejoj (en ili partoprenas la eksperimentaj klasoj pro kontrolo). Internaciaj lernejoj (someraj lernejoj) estas bonaj demonstriloj pri la praktika uzebleco de Esperanto ankaŭ en internacia lerneja kadro. Pro tio ili devus esti la fina punkto de ĉiu lerneja eksperimento.
3. 1978 - 1980
- 3.1 Plurregionaj eksperimentoj en elementaj lernejoj ekde duaj ĝis triaj klasoj kiel bazo por sekva fremdlingva instruado.
- 3.2 Daŭrigo de la lokaj eksperimentoj sub novaj demandoj, ekz. mezuro de la lerntempoj.
- 3.3 Generala kaj specifa diskutoj kun oficialaj instancoj surbaze de la akiritaj rezultoj kaj ties konkludoj.
4. 1981 - 1982
- 4.1 Observado de la gelernantoj estintaj en eksperimentaj klasoj dum la lernado de aliaj fremdaj lingvoj.
- 4.2 Ĉefa atako per argumentoj kontraŭ la establiĝinta fremdlingva instruado.
- 4.3 Periodo de la plej konsekvencaj bruoj kaj agadoj (t. e. energiaj postuloj pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn).
5. 1983 - 1984
- 5.1 Multnombraj kaj intensaj, internaciaj renkontiĝoj por gelernantoj kaj instruistoj.
- 5.2 interŝanĝoj de gelernantoj inter «Esperanto-klasoj».

Parolante pri Esperanto.

Parolado de d-rino Catina Dazzini en Sonnenberg.

La mia ne estos prelego, mi havas nur la intencon kiel instruist(in)o pri Esperanto doni al Vi kelkajn indikojn, kiuj ebligas pluan profundigon via flanko.

Ofte oni demandas ĉu ekzistas Esperanto-Literaturo. La saman demandon oni faras ankaŭ pri la Romia Literaturo.

La ĉefa argumento, kiun kutime oni uzas kiam oni volas diskuti ĉu Esperanto estas lingvo aŭ ne (ne ridu!...) estas, ke, ne ekzistante Esperanto-popolo, povas sekve ekzisti nek lingvo nek literaturo.

Kiamaniere oni povas kontraŭbati? Nur per informo, informado kaj dokumentado ĉar plejparte parolas pri Esperanto skeptike aŭ kritikas tiuj personoj kiuj ne konante la lingvon, nek ĝian literaturon nek la socian valoron de la evoluo de la homaj kontaktoj kaj interkomunikoj pere de ĝi, stulte kaj naive ne volas akcepti la ideon, ke Esperanto spite al ĉiuj tradiciaj teorioj pri formiĝo de naturaj lingvoj, ekestis, evoluis kaj beletris.

Mi montros kiamaniere Vi povos studi la Esperanto-Literaturon kaj posedi ĝin bone ne nur por instrui ĝin al la Esperantistoj, sed precipe por prelegi informante la ne-Esperantistan publikon.

Kiel Vi bone scias ĉiuj literaturoj komencis per poeziaĵo kaj estas substrekinda la fakto ke ankaŭ Esperanto kvankam tre juna lingvo havas originalajn poeziaĵojn kiel MIA PENSO kaj HO MIA KOR' de Zamenhof mem, al kiuj sekvis poeziaĵoj de Grabowski (1857-1921), pola kemia inĝeniero de Varsovio, la unua Esperanto-poeto:

- LA LIRO de la Esperantistoj
- La 6 originalaj poeziaĵoj de PARNASO DE POPOLOJ
- TAGIĜO
- REVENO DE L'FILO, kaj
- SUR UNU KORDO.

La Esperanto-poezio estis for de infanaĝo, pli matura pro enhavo kaj verstekniko pere de la ORA DUOPO (Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy de la Hungara skolo) Menciindaj:

- MONDO KAJ KORO de la «poeto de la poetoj KALOCSAY
- PRETER LA VIVO de la «poeto de la popolo»-PACJO-BAGHY. 1922.

Verdire por ke oni povu paroli vere pri literaturo, oni devas atendi, ĝenerale, ke la popolo havu civilizon, ĉar literaturo fakte kaj jure ekzistas nur kiam ĝi esprimas ian civilizon, kaj interligiĝas kun la civilizo mem: kiam civilizo de iu popolo mortas, ankaŭ se la lingvo postvivis tamen ĝia literaturo mortas. Ni Esperantistoj kaj ne nur ni estas konvinkitaj, ke estante Esperanto internacia, monda lingvo povas havi internacian literaturon, ĉar ĝi estas esprimo de civilizo en la tuta mondo.

L.L. ZAMENHOF, ĉar lia celo estis pruvi al la ankoraŭ skeptika mondo (tamen skeptikuloj ekzistis, ekzistas kaj ĉiam ekzistos), ke la lingvo kapablas ĉion esprimi, eĉ la plej altajn sentojn kaj la plej malfacilajn pensojn, ne volis verki kaj sin dediĉis al traduko de ĉefverkoj de diversaj naciaj kulturoj

- HAMLETO de Shakespeare (1894)
- LA REVIZORO de Gogol (1907)
- GEORGO DANDIN de Molière (1908)

- LA RABISTOJ de Schiller (1908)
 - IFIGENIO EN TAURIDO de Goethe (1908)
 - MARTA de Orszesko (1910)
- Kaj post lia morto aperis:

- MALNOVA TESTAMENTO (1926)
 - LA FABELOJ de Andersen, 4 Volumoj (3 en 1932, kaj la 4a en 1963)
- Konsiderante ke mi ne intencas prezenti historion de Esperanto-Literaturo tradukita kaj originala mi, prezentos nur unu verkiston, kiu laŭ mi multe kaj plej vaste kontribuis al la evoluo de originala Esperanto-Literaturo.
- JULIO BAGHY, la poeto de la popolo, (1891-1967)
- Matura poezio estis en liaj manoj kaj li kreis siajn proprajn formojn kaj pere de poezio li respondis al la idealo de ĉiuj popoloj.
- en PILGRIMO (poemaro eldono de la aŭtoro Budapeŝto 1926,) li verse pri-traktas patose la sociajn problemojn kaj li daŭre konsentas kun la subpremitaj tavoloj de la socio.
 - en VAGABONDO KANTAS (eldonita de liaj geamikoj en Budapeŝto 1933) ni povas trovi en la sepdek kvin poemoj senartifikan, spontanegan, melankolian poezion en perfekta formo.
 - en SONGE SUB POMARBO (eldonis Stafeto en 1958) - triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj. Lia voĉo sonas kvankam iom lace kaj pesimisme, tresobre kaj saĝplene; el ĝi kiel stranga peza vaporo leviĝas nova, ne oficiala kaj senpretenda optimismo, foje esprimita kiel fuĝo el hodiaŭo foje kiel riproĉo al hodiaŭo. Li ekstraktis multajn problemojn, kiuj estis komunaj al la tuta homaro, kaj speciale al la juna generacio, kiel skribis Drago KRALY en 4 PRELEGOJ pri Esperanto-Literaturo, Ljubljana 1960.
 - CIELARKO - popolfabeloj de 12 folkloroj verse originale verkitaj eldonis Stafeto 1966.

Pri PROZO estas citindaj la tri romanoj:

- VIKTIMOJ (1925) - SUR SANGA TERO (1935) - kaj la VERDA KORO (1937-62) en kiuj aŭtobiografie li priskribas kun granda realeco kaj klasika stilo la suferojn de la siberiaj militkaptitoj.
 - DANCU MARIONETOJ: originala novelaro eldonita en 1927, en kiu prezentigis profunda sento kaj homa komprenemo por la elpuŝitoj de la vivo, ofte tre realisma kaj pesimisma pensmaniero.
 - HURA! Lia plej ampleksa romano (eldonis Litetaturata Mondo 1930) prezentas kontraston inter la seriozaj kaj humoraj partoj, la aŭtoro tuŝas gravajn sociajn problemojn kaj montras du tendencojn estante majstre grimaca satiro pri la socio kaj utopie dubema pri socio pli bona, ĉar kie estas homoj ofte mankas bona solvo! La romano aperis ankaŭ en germana lingvo. Simpatiantoj al Laborista movado Baghy skribis en Hura!: «nur en iu nova kulturo, la bona kulturo povas redoni al la homaro la perditan Paradizon» Mi havis la ŝancon plurfoje renkonti Baghy, Li estis vere aparta homo, kaj kvankam elstara akademiano, li estis sincera s.ano, frato-amiko, Li estis PACJO. Mi havas personajn rememorojn kiam dum ekskurso al SZEGED ni sidis vidalvide en la kupeo kaj Li longe babilis romantike kun mi, kaj Li diris, ke Li emis esprimi tion, kion Li sentis tute simple, kaj mi pensis al la verso de Dante: «ed a quel modo e ciò ch'è ditta dentro vo significando» = Kaj laŭ kiel interne diktas ĝi mi signifigas. (Piug. 24 V' 53-54) «Li ĉiam sentis inspiron, kiu plenigis Lin kaj verŝis versojn kiel akvo de l'rivero aŭ sango el la koro.
- Se Vi legas iliajn versojn vi sentas ke en ili batas ia granda koro, la koro de Paĉjo kaj ankaŭ se Vi Lin neniam renkontis vi sentas ke Li estas Amiko via, amiko de la homaro, Li estas ja la poeto de la popolo; tiuj kiuj Lin konis, des pli sentas kiel grava estis tiu Esperantisto, bonŝance ke Li ne estis avara kaj multon verkis.
- Do, alproksimiĝu al Lia muzo kaj vi trovos ion ankaŭ por Vi!

Substreku Lian nomon per ruĝa krajono ĉar Li ne estis nur poeto kaj verkisto dum pli ol 45 jaroj, Li ne maljuniĝis, tio okazis ankaŭ al mia Patrino, estas 76 jaraĝuloj, kiuj restas junuloj, tamen Li estis malnova Esperantisto, ĉar Li naskiĝis Esperantisto, li sopiris kiel multaj inter ni al pli bona mondo kaj en kelka senco Li atingis ĝin kaj en «Letero al Kalocsay» Li skribas:
ni donas tutan vivon sen ŝancelo
por servi per la Belo por la Bono,
por estonteco, por la nova homo.

Eble Lia vivo povas montri al ni, ke en iu momento de nia vivo okazas io, kio sugestas al ni fari ion: kiel se estus destino!

Li estis aktoro, kaj militkaptito kaj vaganta apostolo, sed estis ankaŭ edukisto. Li instruis al pluraj generacioj gvidante kursojn, jen alia granda merito de Baghy...Li instruis la lingvon kaj organizis la literaturajn vesperojn en ERA (Esperanto-Rondo-Amika en jaro 1921) kun viva gazeto; en 1922 fare de Li, Schwartz kaj Kalocsay fondiĝis LITERATURA MONDO, ĝi estis literatura organo kaj centro de la tiama Esperanto-mondkulturo, kaj Baghy estis ĉefredaktoro.

- Do, imitu Lin almenaŭ en la bona volo ĉar bedaŭrinde mankas al ni Lia kapablo kaj eble neniu povos nei, ke Esperanto havas riĉegan literaturon fare de spiritigantoj.

Nuntempe post tiom da progreso turmentas la atomtempajn homojn la dubo ĉu la homo, sklavo de la tekniko, kapablos bremsi tiun mekanismon, kiu minacas ekstermi lin..... kio estas fareda?

- Eduki oni devas la homojn, por ke ili rekonsciiĝu, eble ankaŭ Esperanto povas helpi en tiu ĉi kampo, pro tio eklaboru en la kampo de literaturo, ĉar tiel oni povos pli facile montri al la skeptikuloj, ke Esperanto alportas al la homaro la plej altajn valorojn de civilizacio de la tuta homaro mem; kiel la Naciaj Literaturoj estas la marmoreroj el kiuj konsistas la literaturaj naciaj mozaikoj, Esperanto ebligas, ke ĉiu nacia literatura mozaiko estu entenata harmonie en la plej vasta mozaiko de la monda literaturo.

Vidu, parolante kun parlamentano mi rimarkis, ke en Italujo malfacile oni distingas la literaturon de la politiko, eble ĉar en Romo niaj praavoj, la Latinoj, submetis ĉiam literaturon al politiko: la popolo strikte obeis, ofte blinde al la Stato. Tamen, por ni modernuloj estas priskribenda historio de monda literaturo kiel progreso de la homaro, kiu ja deziras, liberigante de la Stato kaj de la politiko mem, pruvi sian universalan valoron. De la komparo inter la diversaj literaturoj venas la instruo kaj la stimulo, kaj Esperanto estas la ilo, la lingvo taŝga por skizi tian historion

- Kiel mi diris je komenco, la mia ne estis prelego, sed, kiel mi faras en miaj klasoj kun miaj atentaj gelernantoj mi invitas al konversacio kaj aplikas la sistemon de la laborgrupo, Nun estas via vico, estimataj gekolegoj kaj mi estas certa ke Vi ĉiuj multe pli kompetente, ol mi, Vi povos kontribui kaj trovi bonan vojon por helpi al nia Afero.

INTERNACIA EKZAMENO

Ni memorigas vin pri la broŝuro eldonita de UEA en jaro 1973.

INTERNACIA EKZAMENO Specimenaj demandoj

Mendu ĝin por prepari internacian ekzamenon. Tre utila!

Rimarkoj al la raporto «Komunuma instrupolitiko».

*Nescio kaj antaŭjuĝo estas
plej grandaj baroj sur la vojo
de la progreso.*

La centra problemo

Laŭ la raporto de prof. Henri Janne la centra problemo estas kiel oni povas fari Eŭropon praktike homogena, konservante ĝian historian kulturan diversecon.

Ĉar praktika same kiel historia kulturoj ne estas penseblaj sen la homa lingvo - se oni ne volas limigi sin al la kulturo de muziko, danco kaj sporto - la problemo estas solvebla akceptante praktikan interkomunikilon kiu samtempe povas transdoni ĉiujn kulturajn valorojn.

La termino praktika implicas ke la komunikilo estu en la atingopovo de la grandaj amasoj, konforme al la konstato en la Baza Noto ke la instruo fariĝis amasa instruo. La principo de la demokratio postulas ke oni solvu la lingvoproblemon neelitece kaj nediskriminacie.

Konservo de kultura diverseco signifas ke la enkondukota komunikilo neniel malutilas al la popolaj lingvoj, nek ilin diskriminadas. Kontraŭe ĝi postulas ke oni progresigas la respekton kaj aprecon de la popolajn karakterojn en Eŭropo.

Kio mankas al la nuna strebado al integriĝo estas ke oni tro malmulte faras por ebligi al la Eŭropa loĝanto sperti Eŭropon. Tiu sperto multe dependas de la konscio ke oni povas konversacii senbare kun ĉiu en Eŭropo. En personaj konversacioj la ĝermo ekestas por solidareco, sed solidareco bazas sur egalrajteco. En la interparolo inter la enloĝantoj de malsamaj naciecoj tial la egalrajtigateco estu garantiita. Tiun kondiĉon nur plenumas lingvo, kiu estas fremda lingvo por ambaŭ semkonversacianoj.

Se aŭtentika Eŭropa kulturo naskiĝu kun supernacia karaktero, supernacia lingvo estos la adekvata medio. La latina antaŭe ludis tiun rolon en la kultura supera tavolo de Eŭropo, sed tiu estis eliteca, do nedemokratia lingvo.

La supra rezonado kondukos al la rekonno, ke Esperanto estas la lingvo kiu kontentigas la postulojn. Pro sia reguleco kaj simpleco tiu ĉi lingvo estas en la mensa atingo de la amasoj, per sia vasta sperto ĝi pruvis esti uzebla por sia praktika kaj kultura tasko, per sia neŭtraleco ĝi garantias la egalrajtigatecon de la enloĝantoj rigarde al la lingvorego kaj ne minacas iun ajn popolan lingvon per diskriminacio.

Neglekto

Estas neglekto ke la raporto de prof. Janne per eĉ ne unu vorto mencias Esperanton. Tiu tamen ne devenas de la elirpunkto de lia laboro. Tiu estis la Baza Noto kaj la Konversacia Noto kaj ambaŭ lasas sufiĉe da spaco por la mencio de la enkonduko de Esperanto en la Eŭropa instruado. La Baza Noto ja tezas ke la instruo en Eŭropo «aldonu almenaŭ du novajn aspektojn al la laboro por la Eŭropa unuigo», nome a) *plilarĝigo de la naciaj horizontoj al memplivastigita Komunumo kiu nun (?) kapablas porti sian modan respondecon* kaj b) *progresigo de la sopiro al unuigo kaj la elekto de komuna sorto, kiu devos esti travivata en la riĉeco de plena rekonata kaj plene utiligata diverseco* (p.62 maldextra kolono ned. eld.). «*Diverseco kaj interŝanĝo estos plej bone realigataj kiam oni ek de la unua nivelo enkorpiĝas duan lingvon en la instruado*» (p.63 m.k.).

Neneglekteblaj faktoj

Pro serio de kialoj la nomita neglekto estas malprava.

- 1) Jam antaŭ la komenciĝo de tiu ĉi jarcento Esperanto funkciis kiel Eŭropa lingvo en internaciaj rilatoj, kvankam en modesta skalo, ĉar ĝi estis instruata en nur malmultaj lernejoj, la lernado estis nedeviga kaj financa subteno neglektebla. Ĝi tute kontentigis la praktikajn kaj kulkurajn celojn, kiel interalie evidentiĝis el la nombraj internaciaj kongresoj (kun eĉ ĝis 5000 partoprenantoj!).
- 2) En 1923 artikolo 7 de la Statuto por telegrafio de la Mondunuiĝo por Telekomunikado rekonis Esperanton kiel klaran lingvo. Oni rajtas redakti telegramojn en ĝi sen plialtiĝo de la tarifo.
- 3) En 1954 la Asembleo de Unesko rekonis la valoron de Esperanto por edukado, scienco kaj kulturo kaj donis mallonge post tio al la Universala Esperanto-Asocio la staton de Konsilanta Organizaĵo.
- 4) La leĝo pri la instruado de pluraj landoj inter kiuj Nederlando, prezentas la eblon por nedeviga instruado en Esperanto.
- 5) En nombro de lernejoj en la landoj de la EEK Esperanto estas instruata. Nombrado de 1965/66 menciis 149 lernejojn, el kiuj 63 en Francujo, 33 en Anglujo, 18 en Italujo, 13 en la Federacia Respubliko Germanujo, 12 en Nederlando, 6 en Belgujo kaj 4 en Danujo.
- 6) La duan fojon okazis en 1974 en Lieĝo trisemajna internacia universitata somerkurso pri la kampoj de biologio, kemio kaj sociolingvistiko, kie sole Esperanto estis uzata.
- 7) En marto 1974 la unua numero de la gazeto *Education for Europe* aperis ankaŭ en Esperanto. Ĝi estas eldonata de la *Centro Européen de la Culture* en la kadro de *Campagne d'éducation Civique Européenne*, en kunkaboro kun la Eŭropa Esperanto-Centro.

Surbaze de tiuj faktoj la nekonsidero de Esperanto signifas preterlasojn. Preterlasoj precipe malutila al Eŭropo, ĉar alternativa propono mankas en la raporto.

La liberiga konkludo

La ĉapitro «Lingvokono» (p.33 k.s.) elvokas la imagon pri katoj ĉirkaŭirantaj varmegan kaĉon por eviti bruligi sian buŝon. Oni rekonas la fortan pliiĝon de la nombro kaj diverseco de la internaciaj renkontoj, sed sin limigas al la nedefinita konsilo «lernu fremdajn lingvojn» aŭ «lernu iun duan lingvon». Oni tiel evitas la necesan konkludon ke ĉe ĉiuj renkontoj la komunikado nur efike povas sukcese se ĉiu lernas la saman duan lingvon.

La konkludo kiun la raporto jes atingas estas ke «*la optimuma progresigo de sia lingvo aŭ lingvoj fare de ĉiu Membro-Ŝtato okazu en reciproka kunlaboro, por kiu la Komunumo povas fiksi la formojn en spiro de reciprokeco en plurflanka interŝanĝo*» (p.36 m.k.). En tiu eldiro mankas ĉiu klara rekomendo, oni deŝovas la malfacilaĵon al la Membro-Ŝtatoj pro timo de «predkaptiloj kaj ĉaspinĉiloj». Tamen oni faras nekovritan traton al spirito de reciproka kunlaboro. Tiel la stato, kiun oni asertas voli plibonigi, restos la sama. Ĉar ĉiu lando jam delonge klopodis adapti sian lingvoinstruadon al la bezonoj de la tempo kaj de sia pozicio en la mondo.

Se oni ne estus evitante la konkludon de la sama dua lingvo, la sola konskvenco estus ke oni devus rekomendi por ĉiu kiel duan lingvon iun ekster-eŭropan lingvon aŭ iun supernacian lingvon. La elekton de la plej disvastigita ekster-eŭropa lingvo, la Ĉina, prof. Janne kaj liaj kunlaborantoj certe ne farus. La alternativan elekton de supernacia lingvo - kio estus farita lingvo - ili evidente ankaŭ ne volis. Ĉar oni rajtas supozi ke ĉiuj kunlaborantoj estas iam aŭdintaj pri la ekzisto de tiaj lingvoj kaj de Esperanto. Ke Esperanto ne estas menciita, signifas ke ekzistis motivoj kiuj malhelpis almenaŭ la mension, kvankam tiu lingvo, pretendas

povi solvi la internaciajn lingvo-problemojn, Tion la scienca akurateco kaj objektiveco postulus.

La malpovo de la raportanto kaj liaj kunlaborantoj veni al rekomendo estas klarigebla: en la limigita kadro de la etnaj lingvoj ne ekzistas solvo. Tiun oni nur trovas kiam oni akceptas novan dimension: tiun de suprenacia lingvo. Tiukaze onikrome *malligu* la internacian komunikadon dis de la kontakto kun la historiaj kulturoj. Por efika internacia komunikado oni elektu kiel solan lingvon la tra-kaj-trae provitan Esperanton. Por la kontakto kun historiaj kulturoj oni prenas ĉiujn en Eŭropo disponeblajn lingvojn. La komunikan lingvon ĉiu devos lerni se ĝi povu funkcii, la etnajn lingvojn tiuj lernas kiuj sentas bezonon pri tio kaj posedas por tio la kapablon.

Tio kompreneble ne signifas ke kultura komunikado aŭ literatura kulturo estus neeblaj en Esperanto: male, ekzistas multe da origina prozo kaj poezio en Esperanto, same kiel granda nombro de bonegaj tradukoj de klasikaj aŭtoroj el multaj lingvoregionoj.

Ankaŭ direktivoj: *Esperanto devige por ĉiu kaj ĉiuj lingvoj libere por la kapabluloj* ne estas kontraŭaj kaj povas solvi la lingvoproblemon grandmezure. Ĉe tio neniu lingvo estas privilegiita aŭ senrajtigita. Libera komunikado estas garantiata, konforme al libera trafiko de homoj kaj materioj. La elekto de la neŭtrala Esperanto evitas ĉiujn politikajn kontraŭaĵojn kaj kun tio ĉiujn delikatajn facetojn de privilegiado kaj diskriminado. Krome tio malfermas la eblojn de libera komunikado kun la mondo ekster Eŭropo.

Se oni relegas la raporton kun tiu ĉi solvo ankaŭ siaj okuloj, oni konstantos je sia surprizo ke ĉiuj esprimitaj deziroj estas kontentigataj en plaĉa maniero.

Speciale la alineoj koncerne la lingvoscion en ĉapitro III *Generala konkludo* (p.57 m.k.) perdas sian urtikajn karakteron: «*Eĉ se la Komunumo havas la devon aktive agi, tamen oni demandas ke ĝi scias eviti ke iel premo estas farata al la lernado de iu lingvo. Lerni lingvon ja estas persona ago, postulanta personan motivadon. Krom tio nenio estas pli frustrada ol la scio de lingvo kiun oni ne uzas*». La nomita premo estas aferkoncerna rilate la etnajn lingvojn, sed nekoncecna rilate al supernacia lingvo, ĉar ĉiu estas motivita por garantiita internacia komunikado. Devigante ĉiun en Eŭropo lerni Esperanton kiel duan lingvon neniu nacia lingvo estas diskriminata aŭ forprenata. Male: pro la propedeŭtiko de Esperanto la lernado de etnaj lingvoj estas plifaciligata. Por la lernantoj kiuj ne deziras lerni aliajn fremdaj lingvojn, la frustrigo de la nevolita devado, sen forfalo de la internacia komunika eblo por ili. Altrudas sin komparo kun la deviga instruigado: tiel kiel ĉiu akiras de ĝi la ŝlosilon al la skribita kulturo, tiel la deviga lernado de Esperanto donos al ĉiu la ŝlosilon al la internacia komunikado. Ĉiuj kiuj krome deziras aliron al iu fremda kulturo per la koncerna lingvo, devas havi la eblojn lerni ankaŭ tiun. Same la franca kiel la angla restos lingvoj de multaj dezirataj, sen ke tiuj lingvoj, estos altrudataj al tiuj ilin ne deziras. Do devigo (por Esperanto) apud libereco (por ĉiuj aliaj lingvoj).

Nova dimensio de nia kulturo

Esperanto aldonas novan dimension al nia kulturo. Bona instruado de Esperanto enhavas legomaterialon prenitajn el multaj kulturoj kaj kontaktigas la lernanton kun multaj popoloj. Ĝi lin stimulas ekkrespondadi kun infanoj de aliaj popoloj per kio li vastigas sian vidokampon. Tio kreskigas respekton por aliaj popoloj kaj iliaj kulturoj kaj laboras en la spirito de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Senbara komunikado dum vojaĝoj en matura aĝo progresigas rektan interŝanĝon de pensoj kun pluraj popoloj. La persona kontakto per lingvo apartenanta sammezure al ĉiu samkonversaciano, multe progresigas la solidarecon inter la popoloj. Esperanto do disvolvas supernacian etoson. Interlerneja korespondado kun la tria mondo estas faciligita de Esperanto: tiu ĉi lingvo estas pli multo en la mensa kapablo de infanoj kaj instruistoj ol la etnaj lingvoj kaj ne odoras pri diskriminacio aŭ novkoloniismo. Kion nia tempo bezonas estas pli da solidareco.

Ĉe la instruado de etna lingvo tiu ĉi faceto ne tiom sin prezentas, ĉe tio la rigardo ja estas nur direktika al unu popolo kaj unu kulturo.

Ĉar Esperanto ankaŭ funkcias en aliaj partoj de la mondo kaj post akcepto de Eŭropo havas ŝancon ankaŭ alie iĝi oficiale akceptita, ne ekzistas la danĝero ke ĝi kontribuas al la ekesto de Eŭropa ŝovinismo: male, ĝi donas egalajn ŝancojn al landoj ekster Eŭropo.

Esperanto kontentigas multaj dezirojn

«Diverseco kaj interŝanĝado estas plej bone realigitaj se oni enkorpiĝas en la instruadon ek de la unua nivelo iun duan lingvon» (p.63 m.k.). El la antaŭa estos klare, ke oni elektu kiel «iun duan lingvon» Esperanton. Koncize la argumentoj estas resumitaj malsupre. Kelkaj faktoj estas aldonitaj.

- 1) Pro la simpleco kaj reguleco de la gramatiko eĉ la juna infano povas rapide lerni regi la lingvon. Ĉe tio ĝi sentas sin certa kaj spertas kontentecon.
- 2) La samo validas por plenaĝuloj, ankaŭ -ĉe eksterlerneja studado.
- 3) Esperanto estas laŭ ĝia vorttrezoro grandparte Eŭropa lingvo kaj pro tio elstare taŭga por internacia komunikado en Eŭropo.
- 4) Esperanto progresigas klaran stiladon kaj konscion pri frazkonstruo kaj vortuzo.
- 5) Esperanto progresigas kaj faciligas la studadon de aliaj fremdaj lingvoj. Tio estas eksperimente konstatita en Anglujo kaj Finnlando, dum tio ankaŭ estas la sperto de multaj Esperanto-docentoj. Samopinias prof. Mario Pei, profesoro pri romana filologio ĉe la *Columbia* Universitato.
- 6) Pro la simpleco Esperanto ne estas eliteca lingvo por infanoj kiuj longe povas iradi al lernejo. Ĝi taŭgas por la homamasoj. Ĝi estas demokrati-lingvo, estante nenies, respektive ĉies posedaĵo. La angla kaj la franca apartenas ĉiu al pr. 1/6 de la Eŭropa loĝantaro; deviga instruado en tiuj lingvoj trudas ĝin al 5/6 de Eŭropo (do al plimulto).
- 7) Esperanto ne minacas naciajn kulturojn, ĉar ĝi volas servi nur la internaciajn rilatojn. Ĝi malhelpas al neniu lerni ankaŭ aliajn lingvojn.
- 8) Pli ol 150 fakterminaroj (libro-aŭ broŝurformaj) aperis kaj faciligas la uzadon de Esperanto en multaj kampoj.
- 9) Ekzistas multaj kursoj sur diskoj kaj bendoj, per kiuj la necesa instruistaro rapide povas esti instruita. Pro la simpleco de la lingvo tio kostas malpli da tempo ol ĉiu alia lingvo.
- 10) Se ĉiu scias Esperanton interŝanĝado trans la landlimoj de studentoj, profesoroj, teknikistoj, laboristoj aŭ soldatoj ne plu estos problemo.
- 11) La laborado de la Eŭropaj institucioj estos pli rapida kaj pli simpla per Esperanto, nemenciita la ŝparon de mono.
- 12) La problemo de aŭtentikeco kio povas kaŭzi malfacilaĵojn ĉe plurilingva tradukado, estos reduktita al la demando ĉu la Esperanta teksto klare redonas la celitan kaj al la demando ĉu la leganto interpretas la tekston ĝuste (t.e. laŭ la Esperanto-gramatiko kaj semantiko)
- 13) Se ĉiu Eŭropano fine scias Esperanton, la subtekstigo de filmaj kaj televidaj scenoj povas esti limigata al Esperanto. Multaj internaciaj elsendoj povas uzi Esperanton. En 1973, 22 radiostacioj (en 12 landoj) elsendis en Esperanto dum 1100 horoj.
- 14) La uzado de unu internacia lingvo plialtigas la gradon de regado, ĉar oni ne estas devigata dividi atenton kaj streĉon alterne al diversaj lingvoj.
- 15) Eldonado de verkoj kaj revuoj en Esperanto povas grave malaltigi la prezon.
- 16) Publikigo en Esperanto pligrandigos la vendoregionon por aŭtoroj, ankaŭ por produktado.
- 17) La malfacilaĵo trovi por internaciaj traktadoj personojn kun faka kaj lingva kapablecoj, estas reduktita per Esperanto, ĉar preskaŭ ĉiu povas akiri la postulitan lingvokapablecon.
- 18) Enkonduko de Esperanto en Eŭropo kiel dua lingvo por ĉiu transformos

Eŭropon en regiono kie la ebloj de komunikado alproksimiĝas al tiuj de iu sola lingvoregiono.

- 19) En 1972 okazis entute 50 internaciaj renkontiĝoj en 24 landoj koncernantaj pli ol 11 mil personojn.
- 20) Ekzistas pli ol 33 mil verkoj originalaj kaj tradukitaj en Esperanto, inter kiuj la plej famaj el la naciaj literaturoj. Plurfoje Esperanto servis kiel pontolingvo ĉe la tradukado de unu lingvo al alia.
- 21) Ek de 1905, 57 internaciaj kongresoj de la Universala Esperanto-Asocio okazis en 19 landoj kun 163 ĝis 4963 partoprenantoj (mezume 1197).
- 22) La Universala Esperanto-Asocio havas tutmondan reton de delegitoj (personoj kiuj laŭpete plenumas servojn al Esperantistoj), nome de 3556 en 65 landoj.
- 23) «La monda lingvo-problemo» estas esperante redaktita plurilingva socia lingvistika, politika, jura, psikologia kaj ekonomika kvarmonata revuo, kiu multflanke informas pri la lingvoproblemo en la mondo (eldonisto Mouton, Hago).

Fino

En la supro estas klopodita nuligi la neglekton pri Esperanto. Kiel konkludo la moto de la komenco povas esti parafrazita jene:

Nescio kaj antaŭjuĝo pri Esperanto estas la plej grandaj obstakloj al la lingva kaj bona integriĝo de Eŭropo.

G.F.Makkink, mag.biol. (1)
Nederlanda reprezentanto de la
Eŭropa Esperanto-Centro

- (1) Pretas doni pliajn informojn, se dezirata parole. Adreso: Eekhoornlaan 10, Wageningen-hoog, tel. 08370 - 13815. La precipa informa servo de Esperanto estas Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la lingvo Esperanto, Grasmere Avenue 77, Wembley, Middx, Britujo.

Traduko iom plibonigita kaj kompletigita el la nederlanda.
La originala teksto estas sendita al la Direktorejo-Ĝenerala, Wetstraat 200, Bruselo, la 11an de februaro '74.

Calgary (Kalgario) varme bonvenigas vin laŭ «okcidenta» gastama maniero.

Dum la lastaj jardekoj de la 19a jarcento la kanada okcidento estis sovaĝa kaj senleĝa. En 1875 la Rajdpolicanoj (R.C.M.P.) atingis la kunfluejon de la Bow (arko) kaj Elbow (kubuto) Riveroj, kaj tie starigis komandejon. La komandanto, Kolonelo J.F. Macleod, nomis ĝin «Calgary» laŭ gaela vorto signifante «klara, fluanta akvo». La alveno de la Fervojo Kanado-Pacifiko (C.P.R.) en 1883 rapide kreskigis la urbeton, kaj la loĝantaro en 1893 nombriĝis 4.000. Hodiaŭ la nombro estas 400.000. Malgraŭ tio, Calgary ankoraŭ retenas sian emon al amikeco kaj najbareco.

La AVENTŬRO-CENTRO DE KANADO troviĝas je 220 km. norde de la Kanada-Usona landlimo, nur je 120 km. for de Banff, kaj sur la ĉefaŭtovojo tra la Pasejo Rogers al okcidentaj lokoj. Por pli da informo, skribu al:

Calgary Asocio por Turismo kaj Kongresoj.
Gastiga Centro, Mewata Parko, Calgary, Alberta, Canada.

«VOĈO» monata esperanto revuo,
56223 borovo, ŝkolska ul. 25, Jugoslavio.

Revuo «VOĈO» organizas kun celo progresigi originalan esperantan literaturon literaturan konkurson sub la nomo «MAJA VOĈO» por mallonga rakonto verkita originale en Esperanto, nenie antaŭe publike eperinta.

Premiojn prizorgos lokaj instancoj kaj estas jenaj:

- I tre valora Esperanto-libro (nun «Esperanto en Prespektivo»);
- II oleopentraĵo de pentristo Danilo Banić;
- III du bonaj Esperanto-libroj (nun libro pri falintaj jugoslavaj esperantistoj kaj «Nuda inter lupoj» de B. Apitz).

Prezidanto de juĝkomisiono estas s-ino Emilja Lapenna, longjara sekretari-ino de Belartaj Konkursoj ĉe UEA.

Regularon vi povas ricevi ĉe suba abreso aldonante 1 int. rpk, (Jugoslavoju unu pm. de 1,20 d.).

Limdato por sendi konkursaĵojn estas la 31-a de marto 1976. al adreso;
«VOĈO» monata Esperanto-revuo, 56223-Borovo, Skolska ul. 25, Jugoslavoju, indikante *por literatura konkurso «Maja Voĉo».*

JUNA AMIKO - revuo por geinfanoj

Alvoko de la landaj ILEI-sekcioj de J. Matéffy prezidanto de HEA, kaj H.Sonnabend prezidanto de ILEI.

- (1) La landa estraro konatiĝu kun la aperintaj numeroj de Juna Amiko, elformu unuecan decidon kaj urĝe ellaboru detalan planon pri laŭeble plej sukcesa diskonigo kaj abonigo al Juna Amiko.
- (2) Necesas mobilizi ĉiujn instruistojn kaj kursgvidantojn, kiuj ĝis nun apenaŭ estas informitaj pri la revuo. Kvankam la ĉefa forto estas direktenda al la pedagogoj, tamen estas dezirinde mobilizi ankaŭ tiujn aktivulojn, kiuj influas diversaj landajn organizaĵojn aŭ lokajn societojn. Penu atingi inter ili pli ol 50-procentan abonon, ili nepre bezonas ja la profundan konon de la revuo, tra kies paĝoj nia posteularo estas instruata kaj edukata.
- (3) Por tiuj, kiuj deziras intense helpi nian revuon, ni fondas la titolon PATRONO DE JUNA AMIKO, kio signifas duoblan aŭ pli ol duoblan abonpagon. Ni fidas, ke inter viaj agemaj instruantoj troviĝos ne nur unu helpema amiko, ili ja plurfoje levis sian voĉon por tia presorgano, kaj bone komprenas ties eksterordinaran gravecon.
- (4) Pere de konvinkitaj instruistoj kaj aktivuloj bv. akiri laŭeble multajn abonantojn inter lernejoj kaj komencantoj, poste instigu ilin partopreni en aktivecoj starigitaj al ili en la revuo.

Kun fido, ke vi komprenas la ekstreme gravan signifon de nia cirkulero kaj, ke vi faros ĉion eblan por la pluekzistado de la pene reeldonita (post 30 jaroj!) internacia lerneja revuo, ni anticipe dankas vin elkore.

Bonvolu nin informi letere.

J.Matéffy prezidanto de HEA
H.Sonnabend, prezidanto de ILEI.

Xa Internacia Konferenco de ILEI Respubliko de San Marino 23 - 29/7/1976.

Danke al Prof.ino Marina Michelotti, novbakita sekciestrino de ILEI en San Marino kaj al gekolegoj el Ĉezeno (Cesena), la Xa Internacia Konferenco de ILEI okazos ĉe

Casa Esercizi di S. Giuseppe
Valdragone
Respubliko de San Marino

de la 23a ĝis la 29a de Julio 1976.

Kiel kutime, ĉiuj partoprenantoj loĝos, manĝos kaj laboros en la samaejo, tio estas, granda, moderna kolegio, kiu kapablas gastigi 170 personojn.

La kosto po persono por la restado, ek de la vespermanĝo de la 23a ĝis la tagmanĝo de la 29a, (6 tagoj de kompleta pensio), estas

En unulita ĉambro	L. 50.000
En dulita ĉambro	L. 45.000 po persono
En trilita ĉambro	L. 40.000 po persono

Konsiderante ke la nombro de la unulitaj ĉambroj estas tre limigita, nur la partoprenantoj kiuj aliĝos pli frue, ricevos unulitan ĉambron.

Por aliĝi, bonvolu skribi al
D.ro Prof. Mario Dazzini
Ĝenerala Sekretario de ILEI
Casella Postale 22
I-54100 MASSA C. (Italujo)

La Itala Esperantista Junularo intencas organizi aŭtobusan karavanon al Ateno kaj se estos sufiĉa nombro da kolegoj kiuj deziras partopreni UEA-kongreson en Ateno, oni povos aliĝi al la karavano kiu forveturos el San Marino la 29an de Julio posttagmeze.

Se la karavano ne okazos, oni havos same la eblecon veturi kune kaj oni ricevos siatempe ĉiu utilan kaj necesan informon.

Provizora programo

- 23/7 - Alveno de la konferencanoj
- 24/7 - Matene: Inaŭguro de la konferenco
Posttagmeze: Laboroj de la konferenco
- 25/7 - Vizito al elementa lernejo en Oltresavio (Ĉezeno)
Posttagmeze: Laboroj de la konferenco
- 26/7 - Laboroj de la konferenco
- 27/7 - Tuttaga ekskurso
- 28/7 - Asembleo de ILEI
- 29/7 - Matene: Konkludoj, rezolucioj, fermo de la konferenco.

Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj

Estraro de la Ligo

- 1) Prezidanto: Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- 2) Vicprezidanto: Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapeŝt X, (Hungarujo)
- 3) Sekretario: S-ro Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- 4) Vicsekretario: S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- 5) Kasisto: S-ro Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo). p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7.

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralio: Ivan T.M. Maddern, Box 411, Morwell 3840, Victoria
Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6 - 18/8/13, A - 1030 Wien
Belgujo: G. Pirlot, Torhoutsteenweg 17, B-8400 Oostende
Britujo: Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP
- Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danlando: Lis Thune, Brembårvänet 15, DK-2650 Hvidovre
Finnlando: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo: F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
Germanujo: Hermann Behrmann, Bahnhofsstr. 54, D-4972 Löhne 1
Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno
Hispanujo: Felipe Gonzales Del Pino, Dona Maria de Molina 15c, Sevilla
- Hungarujo: Marta Cser, Zelay út. 10-14, H-1368 Budapest V
Israelo: Ron Aser, Raanana, Aŝer 5
Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Italujo: Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
Japanujo: Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343
Jugoslavio: Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
- Kanado: George Du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sydney, B.C.
- Kolombio: Manuel Angel M. Apaetado Aéreo 50179, Medellin
Nederlando: O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl-1719
Norvegujo: Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
Nov-Zelando: F. Fleming, P.O. Box 5042, Wellington
Pollando: Teresa Nemere, str. J. Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń
Rumanujo: Ignat Bociort, D-dul Eroilor nr. 7/D, et. 1, ap. 5, Timisoara
Suda Koreujo: Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
- Svedujo: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, S-421 74 Västra Frölunda
Svislando: Kurt Geuert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco
Usono: John L. Lewine, West Stockbridge, Mass. 01266

Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, poŝta 5, Zdaboř V-28, CS-261 05 Přebíram
Germanujo DDR: Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstrasse 37, DDR 195 Neuruppin
Kubo: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 283, Ciego de Avila
Sovet-Unio: Iohannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallin, Eosti NSV
Zairo: Antoine-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu)